THE BRITISH ESPERANTIST

OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)

ISSUED ON THE 15TH OF EACH MONTH.

SUPPLIED TO MEMBERS ONLY.

Vol. XXIV -No. 279.

JUNE, 1928.

THE

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

(INCORPORATED).

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Telephone: Holborn 4794.

Telegrams: "Esperanto", Westcent, London.

Late Hon. President: DR. L. L. ZAMENHOF.

Hon. President: J. M. WARDEN.

President: JOHN MERCHANT.

Hon. Vice-Presidents: G. D. BUCHANAN, MISS E.

A. LAWRENCE.

Vice-Presidents: J. J. BOUTWOOD, J.P., PROF. W.

E. COLLINSON, M.A., Ph.D., W. HARVEY, I.S.O. Hon. Secretary: ROBERT ROBERTSON.

Hon. Treasurer: CHARLES A. FAIRMAN.

Secretary: Montagu C. Butler, L.R.A.M.

Business Manager: CECIL C. GOLDSMITH, F.C.I.

Office Hours: 9-5.30. (Monday till 8.30, Saturday till 12.30).

The Association consists of Fellows Members, Associates, Affiliated Groups and Federations. The Annual Subscriptions are: — Fellows, 21s.; Members, 5/-; Associates, 2s. 6d.: Life Fellowship, £12:12:0; Life Membership £5

A list of Affiliated Federations and Groups will be sent on application. Group Affiliation fee: 6d. per member per annum; minimum, 5/-.

This Official Organ is sent each month to Fellows and Members.

"INTERNATIONAL LANGUAGE."—A monthly magazine in English, devoted to the study of the International Language problem. Includes instructional articles on Esperanto and The Esperanto Student, a supplement for beginners. Subscription, 2/6 per annum, post free.

SUBSCRIPTIONS.

Please note that when subscriptions are due, magazine wrappers will not be crossed in future. Instead of that, a subscription payment form will be enclosed in the magazine in order to facilitate payment.

ANTWERP CONGRESS. B.E.A. CARAVAN.

There are still vacancies on the special train and ship which we are running to Antwerp, but if you wish to come, you are advised to book immediately. A leaflet containing full particulars will be sent to all desiring it, on receipt of a postcard.

We are making all arrangements for members of the caravan, and those who travel with it can be assured of comfort all the way.

BRITA KONGRESO, NEWCASTLE-ON-TYNE, 25-28 MAJO, 1928.

Sendube pro la supera logo de la Antverpena Kongreso, multaj el maj membroj forestis de Newcastle. Tamen, aliĝis proksimume 160, kaj neniu bedaŭris la venon. La aranĝoj estis perfektaj, la vetero bonega, kaj ĉio bone funkciis laŭprograme sen ia bedaŭrindaĵo. Aŭdiĝis neniu plendo, kaj ĉiu foriris tute kontenta.

Pro tio oni ŝuldas koran dankon al ĉiu kiu laboris por la sukceso de la kongreso. Ĉefe,

kompreneble, al la sekretario, S-ro A. R. Fairbairn, kiu majstre ĉion prizorgis antaŭ kaj dum la kongreso, kaj ŝajnis esti ĉie samtempe. Ankaŭ al liaj kunlaborantoj: al F-inoj Devlin, Fleming, Foster, kaj Haig, kaj S-ino Haig ĉe la librovendejo; al S-roj Raine, Shepherd, kaj Kasisto Sutcliffe ĉe la oficejo; al S-ino Wright, F-ino Blair, kaj S-roj MacCann kaj Pattison de la akcepta komitato; kaj al S-roj Brennan, Hall, Hornsby, Ranson kaj Swinburne, kiuj deĵoris kiel intendantoj.

La Kongresejo estis tre taŭga, la kongreslibro (pretigita ne nur tekste sed ankaŭ rilate fotografojn kaj planojn de la nelacigebla sekretario, kiu ankaŭ desegnis la belan kongresinsignon), estis modele aranĝita; kaj bonegaj raportoj aperis en la loka gazetaro.

Jaŭde Prof. Collinson prelegis en Armstrong College pri la problemo de Internacia Lingvo. Sekvis vigla demandado, kiun la preleginto trafe respondis.

Vendredvespere okazis koncerto, kie post komuna kantado aŭdiĝis F-ino Phazey, loka kaj promesplena kantistino kiu estas gratulinda pri ŝia admirinda kantado en Esperanto; S-ro V. Fairbairn (kiu ludis la sakfajfilon de Northumberland), kaj S-ro Adalberto Smit (deklamoj). F-ino D. Knowles, F-ino A. Blair, kaj S-ro R. Hornsby bonege ludis teatraĵon "A Norman Conquest."

Sabaton matene oni vizitis lokajn interesaĵojn. Vespere, post la Ĉiujara Kunveno, senpagaj tramoj kondukis la kongresanojn al Civita Akcepto kiun faris al la Kongresanoj la Urbo Newcastle en la persono de Councillor Joseph Stephenson (reprezentanta la Urbestron, neeviteble for de l' urbo).

Post bonega manĝo provizita de la Urbo la kongresanoj revenis al Armstrong College por publika propaganda kunveno. La loka stacio de la B.B.C. brodkastis la programon dum 14 horoj. Prezidis Sir Theodore Morison, kiu parolis pri la utileco de internacia lingvo por scienco; D-ro Alexandra Fisher (Estrino de Girls' County School, Bishop Auckland), kiu klarigis la helpon kiun Esperanto liveras ĉe la instruo de aliaj lingvoj (Esperanto estas deviga temo en tiu lernejo, kun bonegaj rezultoj); Prof. W. E. Collinson, kiu montris la utilecon de Esperanto por Universitataj profesoroj kaj studentoj, kaj la progreson de la lingvo en tiaj rondoj; S-ro J. Merchant, kiu rakontis humoroplenajn anekdotojn el sia Esperantista sperto, kaj S-ro Adalberto Smit, kies parolo ekzempligis la belsonecon de nia lingvo en la buŝo de sperta oratoro.

Knabinoj el Bishop Auckland lernejo prezentis scenon el Alicio en Mirlando: eble la teksto estis ne tro facila por infanoj, tamen la prezento estis vere admirinda, kaj ni sincere gratulas al la instruistoj kaj la infanoj egale. Dum la vespero kantis multfoje la Prudhoe Gleemen, ne nur angle kaj nordlande, sed ankaŭ Esperante. La kantado estis mirinde bona. Malfacile estas elekti, sed kredeble la du plej impresaj eroj estis "Dolĉa Vent" kaj "Down among the Dead Men."

Dimanĉon matene: Vagado en Jesmond Dene, Fotografiĝo, kaj komuna lunĉo. Je 3.0 en la Katedralo okazis Esperanta Diservo, kondukata de Pastro H. O. Mason. Predikis Pastro L. A. Long pri la vortoj "La vento blovas, kie ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras; tia estas ĉiu, kiu estas naskita de la Spirito." Li komparis Harvey, Kapitano Cook, Zamenhof: tri grandaj homoj, kiuj animite de la Dia spirito laboris por la bono de la homaro. La bendiron parolis Kanoniko G. E. Newsom, paroĥestro de Newcastle.

Vespere oni rezervis seĝojn por la Kongresanoj en la Brunswick Wesleyan Chapel, kie Pastro W. G. Lickes parolis pri la temo "No more foreigners," kaj aludis tre simpatie kaj komprene al nia movado. Efektive, ĉi tiu parolo, kaj la kantado de la du mil ĉeestantoj, estis inter la plej impresaj spertoj de la tuta Kongreso.

Poste okazis koncerto, kie kantis F-ino Phazey (aparte bela estis la kanto "Aŭdu Izrael"), S-ro R. W. Jones, kaj S-ino Boocock. F-ino E. Henderson ludis violonon, S-ro G. H. Sutcliffe

la pianon, kaj deklamis S-ino Applebaum kaj S-ro Smit. Ĉiun kunvenon prezidis en sia neimitebla maniero S-ro J. Merchant, kaj oni sentis denove kiel bonŝanca estas nia Asocio havi tian homon ĉe la direktilo.

Lunde okazis tuttaga ekskurso al Hexham Abatejo, kaj la romana urbo Cilurnum en la Parko Chesters. Vespere la Kongresa Balo, tre bone ĉeestata. Marde kelkaj ĝuis ekskurson sur la rivero.

ĈIUJARA KUNVENO, 26 kaj 27 Majo, 1928.

Salutoj. Oni ricevis leterojn de bedaŭro pro foresto aŭ de saluto, inter aliaj, de Ges. Blaise, S-roj W. Harvey, Rhodes Marriott, Ch. Steel, Andreo Che, Teo Jung, A. Oberrotmann, la I.C.K., la Esp. Asocioj aŭstra, dana, germana, pacifista, universitata, k.m.a.

Oni sendis salutojn al la kongresoj aŭstra, ĉeĥoslovaka, dana, franca, germana, kaj pola.

Raporto, Kontoj, Bilanco, 1927. Akceptitaj

post klarigo pri diversaj eroj.

Oficistoj. La Prezidanto, Vic-prezidantoj, Hon. Sekretario, kaj Hon. Kasisto, reelektiĝis. F-ino O'Brien, S-roj Epton, Holmes, kaj Sturmer, estis elektitaj konsilistoj por la jaroj 1928-1931.

Garantio, 1928. Oni raportis garantion de £470. Dum la kongreso pluaj garantioj portis la sumon ĝis £480. Ankoraŭ mankas £20.

Ĉiujara Kunveno, 1929. Oni unuanime akceptis inviton al Canterbury ĉe Pentekosto.

Literaturaj Konkursoj, 1928. Por la tri konkursoj venis 42 provoj (antaŭan jaron 20). Jen la aljuĝoj. Traduko el angla poemo: Unua premio (30/-), R. F. Banham, Melbourne; Dua premio (20/-), H. Cohen, Londono; Honora Mencio, S-roj W. R. Wood, H. G. Brown, S-ino Roberts. Originala poemo: Unua premio (30/-), F-ino L. S. Grant, London; Dua premio (20/-), S-ino Roberts, Sheffield; Honora Mencio, Pastro D. W. Robson, S-ro G. Erber. Originala Artikolo, Premio (20/-), S-ro W. A. Gething, Luton. Honora mencio, S-ino M. T. Harrod, S-ro L. Demal.

Honora Fratulo. Oni elektis S-ron M. C. Butler Honora Fratulo.

Organizo. Diskutinte kelkajn proponojn ricevitajn el la Konsilantaro, oni decidis proponi jenajn modifojn de la Regularo. Ke oni formale filiigu la Federaciojn, kiuj pagu 10/- jare kaj rajtu po 2 konsilantoj. Ke oni kreu kategorion de Junaj Membroj (malpli ol 18 jaraj) po 2/6, sen voĉdonrajto. Ke oni forigu la kategorion Asociitoj. Proponoj elekti Regionajn Konsilantojn, forigi Grupdelegitojn kaj Grupreprezentantojn, kaj fari la grupan filian kotizon po 5/- por ĉiu grupo, ne estis akceptitaj.

Eldona Kaso. Oni konfirmis la principon, ke la mono de la Eldona Kaso estas uzebla sole

por la celoj de tiu Kaso.

Esperanto Publishing Co., Ltd. Konstatante, ke la proponoj formulitaj ne estas tute kontentigaj, kaj metas oficistojn de la Asocio en malfacilan situacion, oni decidis konsideri la proponitan interkonsenton inter la B.E.A. kaj la Kompanio, sed kondiĉe, ke la B.E.A. estu la sola vendagento por la Esperantaj eldonaĵoj de la Kompanio.

KONSILANTARA KUNVENO, 27 Majo, 1928.

Sub-komitatoj.—Ĉeestis 14 membroj. elektis (preskaŭ en ĉiu okazo reelektis) ĉiujn. Korespondaj Kursoj.—S-ino Clayton anoncis, ke en la fino de la jaro ŝi devos rezigni sekretariecon. Oni esprimis al ŝi plej varman dankon pro ŝia longa laboro en tiu kampo. Fratuloj.—Oni elektis F-inon A. L. Beveridge, S-ron W. A. Gething, kaj S-ron K. R. C. Sturmer, Fratuloj de la Asocio. Ekzamenoj.—Oni petis, ke la Administra Komitato konsideru la nunajn regulojn pri ekzamenoj kaj raportu se ŝanĝoj ŝajnas dezirindaj. Packongreso, Londono, Julio.—Oni decidis sendi du delegitojn.

ADMINISTRA KOMITATO, Marto-Majo, 1928.

Inter la aferoj atentitaj estis la jenaj: Nova Afiŝo propaganda: "Esperanto, the International Language," Aranĝoj pri la Antverpena Kongreskaravano; Nova adresmaŝino por la oficejo; Rilatoj kun la Esperanto Publishing Co.; Tagordo por kunvenoj de la K.R. en Antverpeno; Internacia reguligo de librovendaj kondiĉoj; B.E.A. Stando ĉe ekspozicioj en Birmingham kaj aliloke; Propono donaci premion ĉe la venonta Kimra Eisteddfod (la Eisteddfod malakceptis).

KRONIKO FEDERACIA.

Lancashire and Cheshire. Proksima konferenco: 7 Julio, ĉe Waddington apud Clitheroe. 3.15. Semajnfina loĝado 9/-. Detaloj ĉe S-ro N. Fish, 79 Waddington

Rd., Clitheroe.

Skota. La 23-a Kongreso okazis ĉe la Universitato de St. Andrews, 1-5 Junio. Prezidis S-ro W. M. Page. Ĉeestis proksimume 100. Krom la oficiala aferkunveno okazis Diservo, kaj inter la amuzaĵoj gaŭfo, vistludo, dancado, diversaj festoj kaj akceptoj. Ĉion bonege aranĝis S-ro J. T. Haxton.

South Eastern. Konferenco 16 Junio, en Congregational Schoolroom, Tonbridge. Partoprenontoj sciigu al Pastro W. J. Downes, The Manse, The Drive, Tonbridge. Posttagmeze vagadoj; Teo 5.0; Aferkunveno 5.45; Publika kunveno 6.30. Oni diskutos aranĝojn por

la Kongreso en Canterbury, 1929.

South Midland. Ĝis nun tiu Federacio havis la plej altan procenton da B.E.A. membroj. Aliaj Federacioj notu! Aranĝoj pri la semajnfina kunvenaro 9-10 Junio, kaj pri la rondvojaĝo de ses alilandaj vizitantoj en

Septembro, bone progresas. La Federacia Sekretario kun aliaj Lutonanoj arangis "Rapidan Kurson" por legantoj de la Daily Herald, bazitan sur Roston. Jam ĉ. 120 aliĝis. Prifierinda agemeco en sezono, kiam multaj dormas!

South Wales and Monmouth. Konferenco 16 Junio, ĉe Co-operative Hall, 50 Glebe St., Penarth, 3.15. Tre

plena tagordo.

West Midland. La Konferenco kaj semajnfina "lernejo" allogis 28, kaj bone sukcesis. Adoltlernejo, diskutoj, vagado, teatraĵoj, konkursoj, plenigis la tempon. La raporto finiĝas: We urge groups to organise similar informal week-end schools among themselves, not necessarily residential, so that Esperanto may be used continuously for two or three days instead of once a week for an hour or so.

MORTO.

Philp, Hilda Grange, D.B.E.A., edzino de J. A. Philp, Southampton, kaj pli juna filino de Wm. Harvey, Vicprezidanto de B.E.A., en Edinburgh, la 25an de Majo.

VARIOUS.

Divine Service in Esperanto will be held in St. Ethelburga's Church, 72 Bishopsgate, London, E.C. 2, at 3.15, when the speaker will be R. R. Tredgold.

Londoners should keep in mind the London Club Ramble, 16 June. Meet at Kew Gardens Main Gate, 3.0. 5.0, Tea and Concert. Tickets 1/6. Particulars from F. E. Wadham, 19 Grandison Rd., S.W. 11. Also the Croydon Group Ramble on 7 July. Meet Bickley Arms Hotel, Chislehurst, 4.15. Train: Holborn 3.4; Victoria 3.12; Brixton 3.17; to Buckley 3.43.

How many members follow the monthly book-list? Among things that no group or class leader should miss are the new English-Esperanto Vocabulary (The companion to the "Key") at 2d., and the new propaganda poster for 3d.

"The Labour Magazine," May, has a good article by

Mark Starr on "Thinking Internationally."

"Greatheart," June, has an article by Mr. W. M. Page on "How to Learn Esperanto," which has brought the office many enquiries. Incidentally it contains a full-page portrait. One penny, from 22 Queen Street, Edinburgh.

Language Notes. A series of linguistic studies on Zamenhof's translation of the O.T. begins in the June issue of Kristana Revuo (1/3 per ann., post free, from B.E.A.), and should be helpful to all students of Esperanto.

VERKOJ RICEVITAJ.

Saarbrucken. 8-paĝa ilustrita gvidfolio.

Die Godesburg. 4-paĝa gvidfolio.

El Spertoj pri Interna Funkciado de la Floraj Ludoj. Delfi Dalmau. 23pp., 0.50 sv. fr., ĉe Delmau Liceo, Str. Valencia, 245, Barcelona.

*Nokkel Til Esperanto. Nova eldono de la Norvega

Slosilo. 36pp., 3p.

L'Anatomie et la Maturation des Chaumes d'un pied de Blé Colosse de Razgrad (Triticum turgidum L.) avec un résumé en Espéranto. Tezo por la Doktoreco de la Universitato de Parizo. Athanas D. Athanassoff. Tre interesa kaj sciencoplena verko pri la kresko de tritiko, kun bona resumo en Esperanto.

Za vseobsčim jazykom, tri veka iskanij, S predislovijem Akademika N. J. Marra. E. Drezen. 274pp., kaj granda tabelo. Kompleta verko pri 462 mondlingvoj. bedaŭrinde en la rusa lingvo. Presita en 2500 ekz.

Neacetebla.

La Alta Idealo. Petr. Danov. 24pp. Trad. Dian.
N-ro 1 el Biblioteko "Nova Kulturo," dedicita al la
instruoj de la bulgara instruisto Danov. Prezo 0.40
sv. fr; aŭ por serio de 10 numeroj 3 sv. fr., ĉe Atanas
Nikolov, Str. Car Lv. Sisman, N-ro 19, Burgas,
Bulgarujo.
For la Neutralismon! E. Lanti. 3-a Eldono, 29pp.
Resumo de la fundamenta idearo de S.A.T.
Adresaro de I.L.E.P.T.O. (Internacia Ligo de Esper-

antista Poŝt- kaj Telegraf-oficistaro). 12pp., Ĉe R. J. Filliatre, 54 Rue Custine, Paris 18.

La Tajdo. Kolekto de 39 poemoj de N. Hohlov. 61pp. 1/3.

*La Alta Kanto de la Amo. Laŭ malnova legendo rekantita originale en Esperanto de Teo Jung. Lukse presita: dua eldono: 38pp., 9d.

*La Morto de Danton. Aleksej N. Tolstoj. Tragedio. El rusa lingvo tradukis Nikolao Hohlov. 75pp., 1/8.

Books starred are stocked by the B.E.A. Postage extra. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

The British Esperanto Association (Inc.),

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C. 1.

Official Notices.

NEW HON. FELLOW.

Montagu C. Butler, Kingston.

NEW FELLOWS.

Miss A. L. Beveridge, Calabar. William A. Gething, Luton. K. R. C. Sturmer, London.

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

Bryce, Thomas H.	Newcastle-on-Tyne
Cartwright, F-ino E. Gertrude	1000 to
	Ohio, U.S.A.
Esteves, John G.	New York City, U.S.A.
George, F-ino Edith E.	Tankerton
George, F-ino Mary E.	Tankerton
Godfrey, F-ino Edith	Huddersfield
Greatrex, Thomas S.	Witham
Hare, George W.	Edinburgh
Le Patourel, S-ino Alice I. M.	Plymouth
McElgunn, William H. M.	Belfast, Ireland
Mason, Lewis	Glenfield, Nr. Leicester
Relf, Ernest F.	Teddington
Sawyer, F-ino Emilie	Exeter
Shanks, Jos.	Spanish Point, Bermuda
Spence, S-ino M. C.	Portobello
Stewart, Robert	Glasgow
Wallace, D-ro Cyril A.	Via Lourenco Marques, Port. E. Africa

Still wanted: 352. New members this year: 148.

NEW LOCAL REPRESENTATIVES.

Altrincham	D-ro S. Whitaker
Belfast	W. McElgunn
Dundee	G. Paton
Hull	C. E. Jacklin
Leith	G. Dickinson
Newcastle, Staffs.	F-ino J. W. Montgomery
Perth	J. J. Robertson

B.E.A. GUARANTEE FUND,

	•	£	S.	d.
Previous total (adjusted)		465	19	6
Booth, Norman, Huddersfield			10	0
Cochrane, Miss I., Dumfermline			5	0
Crowther, W. J., W. Bromwich		1	0	0

. P.ch	1			
Fairbairn, A. R., Ryton-on-Tyne	•			1.17
(Total 15/-)	•••	Ä-T	5	0
Gilmour, R., Glasgow			10	0
Goodall, Ges., London		2	2	0
Grant, J. J., Rugby (Total 15/-)			. 5	0
Hall, W. B., Gateshead (Total &	1)		10	0
Hall, Mrs., Gateshead		1	0	0
Hawksworth, Miss K., Southport			- 5	0
Herrick, Miss E., London	•••	81	5	0
Hogg, Miss A., Chester		2 27	5	0
Ibbetson, Miss L., Sheffield		83	10	0
Jayne, E., Croydon		1	0	0
Lishman, R., Middlesborough		1	0	0
Melrose, Mrs. M. B., Edmondsle	10000000		5	0
		2	0	0
Morton, Miss C. M. E., Huddersf	ield .			
(Total £2)		1	0	0
Richardson, Miss E. (Total 10/-)			5	0
Smit, Adalberto, Hague		Ω.	5	0
Stredwick, Miss M., Hastings			10	0
Ward, B. D., Selby			5	0
, a				
	£4	80	1	6
1740	43.20			

STILL REQUIRED to make the guarantee operative. HELP? WHO

DONACOJ AL B.E.A. (Majo, 1928).

Miss M. E. Berry, 13/6; O. E. Sachse, Mrs. Saunders. 10/-; Miss Skeate, W. J. Crowther, Miss Borel, J. H. Murray. 5/-; W. G. Thomson, 2/6; Edinburgh 2/-; E. Hayfield, 1/-.

MONTAGU C. BUTLER, Secretary.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*Wilfrid O. Bishop, Whitstable; Emily O. Hooper, *William H. W. Gregory, Winifred D. Drake, Bere Alston, Devon; *Joseph Bone, Mrs. Mary Campbell, Mary Cumming, *Catherine Cumming, *Catherine V. Brockie, *Marguerite J. B. Forsyth, John Brand, Jessie Johnston, Ayr; *Herbert Davies, Drummoyne, N.S.W.; Mary Ritchie, Wm. C. Crowther, Harry Rendle, Mrs. M. Wing, W. Hartlepool; *Thomas E. Howard, Redcar; *Harold Pearce, Mrs. G. L. Pearce. Thornaby-on-Tees; Alec Clarke, Gladys E. Hawkins, John C. Pleace, Exeter; *Wm. A. Edwards, May L. Bowkett, Dorothy Edwards, Bertha Hoyle, Southport; *Annie I. MacDougall, Kinlochleven, Argyll; Ruth Dean, Manchester.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

Roderick Blackley, Bedlington, Northumberland; Mrs. Gerda Lindström, Agnes M. King, Harry R. Faul, Norah E. Tate, *Frank Salt, Mary E. Kindred, Frances Rae, West Hartlepool; Ernest Browell, Hartlepool; Edith M. Welch, Southport; *Arthur Hubbard, James H. Lees, *Reginald J. Yarworth, Grimsby; Sam D. Brook, Scarborough; Handel Keate, Sheffield; Edith Strachan, Montreal.

*Denotes that candidate has passed with distinction.

WM. HARVEY, Hon. Sec.,

25th May, 1928.

Examination Committee.

VOLAS KORESPONDI.

Anglujo. -- S-ro C. H. F. Martin, 36 New Queen St., Two Mile Hill, Bristol.

Rusujo (Sovetunio). - Instruisto M. L. Tannikov. Seto Vojgaly, Vjatskij ujezd, Vjatskaja gub., pri ĉiu demando, int. gaz., pm.